# Kiu celas konservi sian vivon

Maksimiliano Kolbe

(originale verkita en Esperanto)




2. Se la grajno ne mortas en la tero, / restas sola ĝi.
   Se ĝi morte disfalas en la grundo, / frukton donas ĝi.

3. Se la mondo malamas nin, ni sciu, / ke ĝi hatis Lin.
   Kaj por ke ni ne estu el la mondo, / Krist' elektis nin.

4. Ni nomiĝas amikoj de Jesuo, / se ni sekvas Lin.
   Observante ordonojn Liajn restos / en la amo ni.

5. Kiel amis Jesuo nin, la Siajn, / tiel amu ni,
   kaj demetu la vivon por la niaj, / kiel faris Li.

6. Kio estas dirata en mallumo, / videbligu ni.
   De l' tegment' ni heroldu, kion flustras / ene Di' al ni.

7. Ho patrono ĉiela de l' IKUE, / ni honoras vin.
   Ĵurnalistoj, radio-amatoroj / same gloras vin.

8. Patro Kolbe, la sanktan Senmakulan / arde amis vi.
   Kun Maria vi staras en la gloro / ĉe la tron' de Di'.

KIU CELAS KONSERVI SIAN VIVON • M kaj E (originale verkita): Albrecht Kronenberger
2022-09-25

*strofo 1: Mat 10, 39; 16, 25; Joh 12, 25; n. 16670*
*strofo 2: Joh 12, 24*
*strofo 3: Joh 15, 18 – 19*
*strofo 4: Joh 15, 14. 10*
*strofo 5: Joh 15, 12 – 13,*
*strofo 6: Mat 10, 27; Luk 12, 3*
*strofo 7: Pres-domo Niepokalanów; SP3RN*
*strofo 8: Militia Immaculatæ*